FN PERANC 47


# ESPERANTO NORMANDA BULTENO

.unuiĝo de la normandaj esperantistoj

n°161

TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE.

JULIO 1988A

PRINTEMPO - SOMERO 1 9 8 8 A - ( N° 76A NOVA SERIO )


## KARAJ LEGANTOJ

Veules-les-Roses, bela nomo por alloga loko, gastigos nian Ĝeneralan Kunvenon, la 8an kaj 9an de Oktobro.

Vi trovos ĉi-ene aliĝilon kiun vi bonvolos sendi kiel eble plej rapide por faciligi la taskon de la samideanoj kiuj prizorgas la preparon de tiu renkonto, tiom grava por la vivo de nia regiona asocio.

Jam famaj renkontoj okazis en nia regiono, sed kiel memorigas tiu desegnaĵo, ili estis kelkfoje iomete sango avidaj. Ĉiuj esperantistoj scias ke niaj movadaj kunvenoj disvolviĝas en etoso multe malpli vikingema, eĉ en Normandio.

Do, ĉiuj sen hezite al Veules-les-Roses!!



Desegnaĵo de Ake Gustavsson el : "Les Vikings", Hatier, 1968.

# NIA VIVO EN:

## LE HAVRE

La monataj kunvenoj okazis kontentige. Ni festis Reĝkukan Feston kun novaj lernantoj dum februaro kaj tiuokaze, ni projekciis lumbildaron rememorante kelkajn trafajn okazaĵojn por nia Asocio.

Dank'al klopodoj kaj sindonemeco de havraj gesamideanoj, interesega ekspozicio montris, ene de Biblioteko de Universitato en Havro, diversajn aspektojn de Ĉina vivo pere de artaĵoj kaj fotaĵoj el revuo "El Popola Ĉinio".

Samideano J. Lecroisey vizitis nin post Nacia Kongreso de UFE, okazinta dum fino de majo. Li deziris pilgrimi tra sia nakiĝregiono.



## CAEN

La kurso denove okazos fine de septembro S-ro Angenault partoprenis la kongreson internacian de la Fervojistoj (I. F. E. F.) en Perpignan kie renkontiĝis 450 personoj el 19 landoj. Venontjare ĝi okazos en Hispanio.

Nacia kunveno de tiuj fervojistoj okazos la 24an kaj 25an de Septembro en la "Villa Simone" en Houlgate. Tiuj kiuj pri tio deziras informojn, kontaktu S-ron Angenault Tel : 31 22 22 86.



## YVETOT

La kurso daŭre funkcias kontentige ĉiulunde kun 3 lernantoj.

La grupo kunvenas la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato ĉe unu el la membroj laŭvice por pridiskuti iun temon. Tiuj kunvenoj ĉesos dum la somero ĝis Oktobro.

La 24an de Aprilo, la grupanoj kunvenis en Foyer Saint-Exupéry je la 12a horo por komuna tagmanĝo. Ĉestis entute 29 personoj el Yvetot, Le Havre, Fécamp kaj Grand Quevilly. Post la manĝo, faris tre interesan prelegon kun diapozitivoj S-ro Duhamel pri sia vojaĝo al Pollando okaze de la kongreso en Varsovio.





## PONT-AUDEMER

Okaze de la Jubilea Jaro nia samideano André FERET aperigis tutpaĝan artikolon kies titolo estis "L'Espéranto : message de Paix et outil de communication" en la loka gazeto : l'Eveil de Pont-Audemer.

## ROUEN

Kiel kutime ĉiu ĵaŭde en Grand-Quevilly okazas kurso kun 3 personoj en perfektiga kurso, la elementa grupigas 4 personojn.

Annie Gaillard anstataŭis Petro Lemarchand kiel Prezidanto de la Ruena regiona grupo.

Pro diversaj kialoj la Ruena grupo ne helpis por prepari la nacian kongreson de U. F. E., sed al ĝi lokaj samideanoj partoprenis.

Revenintaj de IFEF kongreso en Perpignan du junaj pollandinoj pasigis tri tagojn en Grand Quvilly kaj ĉeestis la kurson.





## HEROUVILLE

Nia grupo nature kreskas ĉar Véronique naskis bebon kiu ĝis nun nur scipovas la internacian lingvon de siaj samaĝuloj.

Pro tiu grava (eda) kialo, pro laboro, kaj ekzamenoj, la kurso pli malpli regule okazis dum tiuj lastaj semajnoj.

Du Usonaj samideanoj kiuj vojaĝas dum tri monatoj en Eŭropo, vizitis nin pere de "Pasporta Servo". Patrick baldaŭ flugos al Ĉinio kie li intencas renkonti la esperantistojn. Jen alloga raporto por la kurso kiu denove ekos en septembro.

REDAKTAS : Yves NICOLAS, 17-37 Quartier du Bois
14 200 HEROUVILLE Tel. : 31-95-11-81

KOTIZO - ABONO : Por la jaro 1988 : 45 F.
C. C. P. n° 283 40 H ROUEN

ELDONAS : UNION des ESPERANTISTES DE NORMANDIE

"La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj"

# LA UNUA NORMANDA RENDEVUO

Kiel anoncite la "Kooperativo de Literatura Foiro" orga nizis Normandan Rendevuon dum kiu la ĉeestantoj havis la plezuron spekti teatraĵojn de Tespa, aŭskulti la kantojn de Nikolin', nova kaj bela voĉo en nia kantistaro, plibonigi sian esperanton en la kursoj gviditaj de niaj amikoj Lemarchand kaj Pottier, studi la humoron en la verkoj de Baghy. Dua studgrupo kunvenis kun Giorgo Silfer kiu , se ankoraŭ bezone, elmontris sian erudicion sur la lingva tereno.

Malfacile estas raporti pri tiu vasta, riĉoplena prelego ; por ĝin reliefigi jen du eltiraĵoj de kasedoj registritaj, kiuj prezentas nur du malgrandajn partojn de la tuto.

Eltiraĵo 1

...Mi studas la kreolan lingvon, la francidon de Insulo Réunion. Mi studas la personajn pronomojn, kaj mi rimarkas ke "je, tu, il..." en la Kreola lingvo estas "mi, ti, li, ni, vi, zot". Zot signifas "les autres", "mi" devenas de "moi, toi, lui...". Kiam mi ekzamenas ĉitiun elementon, mi konstatas ke tio estas preskaŭ identa al la strukturo de Esperanto, kaj do mi formulas hipotezon ke Esperanto estas speco de planita kreola lingvo, aŭ la kreola francido estas speco de neplanita Eo. ...Ĉar estas evidente iuj elementoj de sintezado, de analizado, de simpligo, faritaj de la kreolaj lingvoj kiuj povas interesi nin...Se hazarde mi malkovras ke la indiĝenoj de Réunion reduktis la francan lingvon en tiu-ĉi kampo obeante iujn leĝojn kiuj estas la samaj leĝoj laŭ kiuj iu tribo en Pacifiko reduktis lingvon mi povas tiam plu analizi kaj pluesplori por trovi ke eble estas iu universala formulo pri kiu ne konsciis la indiĝeno de Réunion, ne konsciis Zamenhof...

Eltiraĵo 2

...La klasika skemo por informadi dum la lastaj 30-40 jaroj, ĉiukaze post la 2a Mondmilito, estis alparoli la homon unuavice por klarigi al li-ŝi ke ekzistas la monda lingvo problemo, kiam la homo konscias pri tio, proponi Esperanton, kaj klarigi kial ĝi estas la sola solvo oportun, demokrata, taŭga,ekonomia por tiu terura problemo (...)Ju pli da homoj ĝin parolas aŭ ju pli da homoj konsentas ĝian uzon, des pli certa estas la venko de Eo. La fina venko, eble ne estas ke la tuta mondo parolu Eon, sed ke la tuta mondo akceptu la ideon ke Esperanto estas la plej taŭga solvo por la monda lingvo problemo. .../...



(el "Monato" aboninda revuo)

**... Sed...**

Tu ŝtatestro havas bezonon de komunikado sed povas esti por la ŝtatestro pli oportune ke ekzistu interpretisto ĉar la interpretisto donas al li la tempon pli mediti pri la respondo kiun li deziras doni, tute banala sed vera klarigo ! Povas esti ke la homo sentas la bezonon pri komunikado sed maksimume por komuniki kun la kelnero aŭ kun la restoraciestro, ne sentas aparte la bezonon rilati al la homoj(...) li havas kontakton kun la plaĝo sed ne sentis la bezonon aliri per komunikado al aliaj homoj. Povas esti ke li deziras komuniki en sia lingvo por havi superecon sur la aliaj. Fine povas esti ke iuj homoj sentas la bezonon komuniki, sed por altigi la materialajn riĉajojn. La komercisto kiu sentas la bezonon lerni lingvon kaj tiel maniere multe gajni, haltas lerni en la momento kiam li sufiĉe konas por pritrakti negocon, sed ne bezonas profundiĝin en la literaturo de la koncerna popolo, en la kutimoj.

Esperanto estas interesa jes ja por la tuta mondo, sed ĝi estas interesa unuavice por tiuj homoj kiuj sentas la bezonon pri komunikado. Bezono pri komunikado kiu estas persona, sendiskriminacia, kaj certagrade alternativa.

Jes ja ni ankaŭ kredas ke Esperanto estas kontribuo al la solvo de la monda lingvoproblemo sed ne pro tio ni daŭre estas esperantistoj. Tio ne sufiĉus ! Povas esti ke la monda lingvo problemo eterne restos, kaj tamen eterne ni ankaŭ restos esperantistoj. Surbaze de tiuj valoroj ni fakte estas kaj restas esperantistoj.

GEJ, JEFO kaj SAT-JF invitas al

## Internacia Junulara Renkontiĝo

en

## Rastatt

## 31.7.-7.8.1988


Temo:

**Naciismo-Internaciismo-Sennaciismo en Eŭropo**

**INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO 1988**

okazos de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto en la arta kaj historia kadro de la urbo Metz (Francio)

- Konferenca temo: *Internacia kaj naciaj kulturoj* sojle de la 2a jarcento de Esperanto, pritraktota dum ampleksa prelegserio.
- Kunvenoj de kulturaj asocioj.
- Kursoj por komencantoj kaj progresantoj.
- Kroma programo por junuloj.
- Postkonferenca aranĝo: *Tri tagoj en Parizo.*



Informu vin ĉe: Esperanto-Klubo, MCL, 36 rue St-Marcel, F-57000 Metz (Francio).

## LA KANCERKLINIKO

Kultura, politika, skandalema, ajnista.
**Abonu iam ajn 5 n-roj jare (4 LKK + la „Krom")**
90 FF – Ĵak Le Puil, 5 Pl. Lavoisier (61) F-93380, Pierrefitte (Francio) – Pĉk PARIS 12 729 73 X (aŭ UEA, Klik-g)

– LA KANCERKLINIKOKRESTOMATIO – n-roj 1 kaj 2 S. Sire, n-roj 3 Kanzonoj (J.P. Danvy), n-ro 4 GeLKKpoetoj.


– LA KANCERKLINIKOTEKO – n-ro 1, „Knedu min sinjorino" – ĥivortaro, red. R. Corsetti.




## LA GAZETO

SENDEPENDA AKTUALA
SESSEMAJNA KULTURA
MOVADA REVUO

Petu provekzempleron ĉe:
La Gazeto, 39 rue J. Henot
57070 Metz, Francio





## KONTAKTO

**Redaktoro estas Leif Gunnar Nordenstorm, Lilla Nygatan 3 B S-961 32 Boden, Svedio.**



## SENNACIULO

Organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda
(SAT)


kies membroj kontribuas al kreo de mondo emancipita, tolerema, sen-antaŭjuĝa.

Aperas monate.
Petu informojn de:
SAT, 67 Av. Gambetta,
F-75020 Paris, Francio

## Monato

**internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo**

monata revuo en la internacia lingvo Esperanto · legantoj en 80 landoj · 9a jarkolekto · aperas la 15an de ĉiu monato · abontarifo varias laŭlande; petu ĝin de la eldonejo · **eldonejo:** MONATO, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; ☎ 32-3-234 34 00; poŝtĉekkonto Bruselo n-ro 000-0265338-43 nome de Vlaamse Esperanto-bond, Antwerpen · valida anonctarifo: n-ro 4 · kompostis kaj presis: Grafika Centro Antverpeno · por adresŝanĝoj nepre resendu la ne plu validan adres-slipon kune kun la nova adreso al la eldonejo · **redaktoro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-8900 Augsburg, FRGermanio ☎ 49-821-520385 · 200 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 40 landoj · aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj)



## esperanto

**Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio**

**Redaktoro: Mark Fettes. Abonprezo: varias laŭlande (Gld. 44,30; US$ 21; DM 39 ktp; 3300 kpj); petu informojn de via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn. Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

## LITERATURA FOIRO

Monata revuo, organo de LF-koop,

Societo Yvonne Martinot, route de Civeaux, F-86410 Bouresse



# 80a Franca Kongreso de Esperanto

U. F. E. organizis ĉi-jare sian kongreson en Rouen de la 20a ĝis la 24a de Majo. Kiel Federaciestro, mi havis la bonŝancon ĉeesti la ĉefajn partojn de tiu kongreso, kiu grupigis proksimume 90 ĉeestantojn, kaj reprezenti oficiale la Normandan Federacion de U. F.E kaj neoficiale U. N. E..

La programo estis tre interesa kaj zorge preparita. Krom la laborkunsidoj (4 komitatkunvenoj kaj 2 membrokunvenoj) okazis ankaŭ tre interesaj prelegoj de francaj kaj alilandaj samideanoj : pri Johana d'Arko (A. Cherpillod), pri la instruado de fremdaj lingvoj en Francio (Edmond Ludwig) kaj en la anglalingvaj landoj (Allan Nutton), pri la lingva politiko en la Eŭropa komunumo (Brian Moon), kaj fine pri AIDS, malsano pli konata ĉe ni sub la franca nomo "Sida"(O. Walz). Krom tiuj prelegoj ankaŭ okazis bonaj kulturaj kaj distraj aranĝoj : interkona vespero (vendrede), balo (sabate), folklor- kaj kantvespero kun la Normanda folklorgrupo "Les Calètes" el Yvetot, kaj la Itala kantistino Suzanna (dimanĉe), distra vespero kun la Grafino (lunde), ekzamenoj (vendrede), Katolika Diservo (dimanĉe), vizitoj de la urbo (lunde), kaj fine tuttaga ekskurso tra Normandio (marde).

Sed ne nur la kulturaj kaj distraj partoj de la kongreso estis valoraj. Estis ankaŭ tre interese partopreni la membrokunvenojn. Efektive, kiam oni laboras loke aŭ eĉ regione por Esperanto, oni tute ne imagas la problemojn kiujn oni renkontas en la grandskala laboro de nacia organizo. Ili estas multegaj, sed la du ĉefaj estas mono kaj la amplekso de la membraro. Kiam U. F. E. volas atingi iun aŭ alian celon, oni ĉiam demandas : "Kiom da membroj vi havas ?". Se ili povus respondi "100 000" aŭ eĉ nur "10 000", oni certe priatentus la peton de U. F. E. sed kun iom malpli ol 1000 anoj, nia nacia asocio aspektas neglektinda kaj senvalora. Pro tio, ĉiu Esperantisto en ĉiu lando nepre devus aliĝi al sia nacia asocio por plifortigi ĝin nombre, kaj finance per sia kotizo. Efektive, en nia nuna mondo, la ĉefa maniero diskonigi ion estas reklamado, sed tiu rimedo estas tre multekosta kaj efikas nur per ĉiama ripetado. Kiam U. F. E. reklamis en televida revuo, ĝi tute vane elspezis tre altan sumon, sed se ĝi estus povinta renovigi la anoncon 10 20 foje, tre certe estus alportinta sufiĉe gravan sukceson. Pro tio U. F. E. bezonas akiri multe da mono kaj ĝi nun studas diversajn projektojn por enirigi monon en sian kason. Inter aliaj ĝi projektas organizi grandajn vojaĝojn por riĉaj esperantistoj, kaj precipe ĝi preparas por 1989 la "Frenezan Semajnon". Tio estas semajna restado en Parizo por eksterlandaj esperantistoj, kun detala vizito de la urbo kaj de ĝiaj monumentoj kaj muzeoj, kaj kun spektaklaj vesperoj, k. t.p por 5 500 frankoj (eventuale 1 200 F. sen loĝado). La profito (13 %) estos uzata por informado.

Alia temo, kiun oni ankaŭ pridiskutis, estas la nekongresemo de la Francoj. Efektive, 90 anoj ne sufiĉas por nacia kongreso. Mi mem rimarkigis dum la diskuto, ke eble la kongresurbo, pro sia situacio geografia, ne faciligas la partoprenon de la Sudfrancoj, sed oni prave respondis al mi, ke eĉ la Normandoj estis tre malmultaj, pli malmultaj ol en regiona kongreso, kvankam nacia kongreso estas multe pli interesa. Al tiuj, kiuj ne venis mi do konklude devas diri : "Ĉeestu nacian kongreson ĉiufoje kiam vi povos. Vi ĝuos tre interesan programon kaj renkontos kelkajn eksterlandanojn, kaj vi certe ne bedaŭros".

P. Pottier

# EMISSIONS DE RADIO EN ESPERANTO

**ıudibles en France)**

Les heures sont indiquées d'après l'heure été en France.

**›us les jours**

| | | |
|---|---|---|
| .30-06.00 | Varsovie | 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz) |
| 00-13.45 | Varsovie | 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz) |
| 30-17.55 | Varsovie | 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz) |
| 30-18.55 | Varsovie | 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz) |
| 30-22.00 | Varsovie | 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz) |
| 00-22.30 | Pékin | 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz) |
| 30-23.55 | Varsovie | 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz) |

**ındi**

| | | |
|---|---|---|
| 30-18.40 | Berne | 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz) |

**ıdi**

| | | |
|---|---|---|
| 00-07.15 | Vatican | 186m (1611 kHz), 48.01m (6248 kHz), 41.38m (7250 kHz), 30.75m (9755 kHz), 25.61m (11715 kHz) |
| 30-18.40 | Berne | comme lundi |
| 20-22.30 | Tallinn | 290m (1035 kHz), 50.63m (5925 kHz) |

**ımedi**

| | | |
|---|---|---|
| 30-18.40 | Berne | comme lundi |
| 00-22.20 | Rome | 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz) |

**imanche**

| | | |
|---|---|---|
| 25-10.30 | Tallinn | comme le jeudi précédent |
| 30-10.55 | Vienne | 48.74m (6155 kHz), 25.18m (11915 kHz) |
| 21.00-21.10 | Vatican | 570m (526 kHz), 196m (1530 kHz), 48.74m (6190 kHz), 48.01m (6248 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.10m (9645 kHz), jours de fête compris. |
| 21.30-21.55 | Vienne | 50.46m (5945 kHz), 48.74m (6155 kHz) |
| 22.45-23.00 | Zagreb | 262m (1143 kHz) |

A partir du 25 septembre 1988 (heure d'hiver) les émissions de Pékin, Rome, Varsovie et Vienne seront une heure plus tôt. Les autres resteront à la même heure.

Vous pouvez écrire à ces radios aux adresses suivantes:

*Svisa Radio Internacia*, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Suisse.

*Radio Pekino*, Esperanto-fako, Beijing: Popola Respubliko Ĉinio.

*Radio Roma*, Esperanto-fako, C.P. 320 Centro Corrisp., I-00100 Roma, Italie.

*Eesti Raadio*, Esperanto-fako, SU-200100 Tallinn, Estonio, Union Soviétique.

*Radio Polonia*, Esperanto-redakcio, Pk. 46, PL-00-950 Warszawa, Pollogne.

*Radiovaticana*, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italie.

*Radio Aŭstrio Internacia*, Esperanto-fako, A-1136 Wien, Autriche.

*Radio Zagreb*, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Yougoslavie

De plus, les parisiens peuvent écouter chaque vendredi de 18 à 19 h une émission bilingue de *Radio Esperanto* (145 rue Asmelot, 75011 Paris, tél. 42 62 90 51) sur les ondes de *Radio Libertaire* MF 89,4 MHz.

Union Française pour l'Espéranto (UFE)
4 bis rue de la Cerisaie - 75004 PARIS
☎ (1) 42 78 68 86 (24h sur 24)

- inscrit les associations sur son réseau d'informations permanent
- dispose de matériel d'étude et de professeurs
  - pour cours par correspondance (3 degrés)
  - pour cours en équipes
  - pour séminaires et stages accélérés
- peut recevoir à son siège des groupes pour information personnalisée
- peut vous fournir des conférenciers pour présenter l'espéranto autour de vous.

NI KUNVENOS EN : VEULES LES ROSES

# 8an kaj 9an de OKTOBRO 1988a

VEULES LES ROSES ESTAS ĈARMA MARBORDA SOMERUMEJO DE PAYS DE CAUX INTER FECAMP KAJ DIEPPE, PROKSIME DE SAINT VALERY EN CAUX.
LA KALKAJ KLIFOJ ASPEKTAS TIPAJ KAJ BELAJ. GRANDA PLAĜO ALLOGAS BANANTOJN DUM BELA SEZONO.
NI ESPERAS KE MULTAJ EL VI DEZIROS PARTOPRENI TIUN UNIKAN REN--DEVUON DUM LA JARO KAJ PROFITI TIES SIMPATIAN ETOSON.

VI LOĜOS EN KOMFORTAJ LOĜEJOJ KUN HEJTATAJ DORMĈAMBROJ UNU AÙ DU LITAJ. VI NE ALPORTU LITTUKOJN, SED NE FORGESU KUNPORTI TUALET--TUKOJN.
FERVOJISTOJ POVOS VETURI TRAJNE ĜIS ST VALÉRY EN CAUX. INDIKU SUR ALIĜILO JE KIOMA HORO VI ALVENOS EN ST VALÉRY POR KE NI ATENDU VIN TIE.

## PROGRAMO :


SABATE 8AN DE OKTOBRO :

- EKDE 13A HORO : AKCEPTO EN V.V.F. (KONGRESEJO).
- 14H30 EKSKURSO.
- 19H30 VESPERMANĜO.
- 21H00 DISTRA VESPERO.

DIMANĈE 9AN DE OKTOBRO :

- 9H30 ĜENERALA KUNVENO.
- 12H30 TAGMANĜO.
- 15H00 PIEDA PROMENADO KAJ DISIRO.

La programo de la ekskurso ne estas preciza , sed ni vizitos multajn vidindaĵojn inter Veules les Roses kaj Dieppe.



# ALIĜILO

Adhésion à adresser avant le 4 septembre.

Sendota antaù la 4a de septembro 88a ĉe :

PIERRE JUILLAUD, 16 RUE DU LIEUTENANT DE VAISSEAU PARIS
76120 GRAND QUEVILLY. TEL : 35.69.66.09.

VEULES LES ROSES SABATE 8AN KAJ DIMANĈE 9AN DE OKTOBRO 1988A.
EN V.V.F. : VILLAGE VACANCES FAMILLE.

NOMO :..........................................

ANTAŬNOMO : ....................................

ADRESO :..............................................

..............................................

POŜTKODO : .............. URBO : ....................

AKOMPANATA DE :
Accompagné de :

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| ALIĜO<br>Adhésion : | _____ | X | 30,00 FF = | _______ |
| SABATA VESPERMANĜO )<br>NOKTO EN V.V.F. (<br>DIMANĈA MATENMANĜO )<br>DIMANĈA TAGMANĜO (<br>(Pension complète) ) | _____ | X | 235,00 FF = | _______ |
| OU / AŬ : | | | | |
| nur la Dimanĉa tagmanĝo<br>(seulement le déjeuner<br>du dimanche). | _____ | X | 75,00 FF = | _______ |
| EKSKURSO<br>Excursion : | _____ | X | 50,00 FF = | _______ |

SUME :
Total : [ ]

Ci-joint un acompte de 100,00 FF par personne pour la réser-
-vation à l'ordre de : "UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE".

Transport : ☐ j'arriverai par la route.

☐ j'arriverai par le chemin de fer à la gare de St Valéry en Caux (10 km) et je désire que l'on vienne m'y chercher à : _____ h.

DATE : SIGNATURE :